## Junulara E-Semajno.




JES 24-25 en Belgio

En la internacia kalendaro de EventaServo kaj en la retpoŝta Bulteno 'TEJO-aktuale' jam de duonjaro troveblas anonco pri la 15-a Junulara E-Semajno, kiu okazos post malpli ol 100 tagoj en Belgio, de la 27a de decembro ĝis la 2a de januaro (kun unuaj alvenoj jam en la 26a de decmbro). Ĉijare ĝin organizas roveroj de la Verdaj Skoltoj kun helpo de pliaj amikoj.

Inter la multnombraj ideoj kaj ambicioj de ĉijara organiza teamo ekde komence troviĝis deziro 'etendi manon al aliaj Esperanto-organizoj'. Evidentas por ni ke kun via helpo ni sukcesos inviti pli da Esperantistoj por konsideri partoprenon al nia evento, kaj ni forte kredas ke kun nia helpo (kaj ideale de ĉiuj grandaj Esperanto-renkontiĝoj) ankaŭ Esperanto-organizoj kiel viaj povus profiti de pli da videbleco, kontakto kaj allogo de estontaj aktivuloj. Klare tiu ĉi deziro nia suferis prokraston, sed nun tamen vivas sian realigon.
Alkroĉite al ĉi tiu retpoŝtmesaĝo troveblas iom longa letero, kiu estas provo nuancoplene kaj tamen konkrete enkonduki al vi niajn ideojn pri indaj strategiaj celoj en nuntempa Esperantujo, precipe rilate al varbado/diskonigado de nia agado, kaj tiu de aliaj Esperanto-aktivuloj.

Esence, ni esperas veki vian intereson **iĝi partnero de JES**.

Aktuale ni jam partneras kun:

**Novulo-patronoj:**

  - GEA+GEJ: donacos po €50 al ĉiu junulo el Germanio kiu partoprenos dum JES al sia unua Eo-evento

- *[Jam priparolata: EN]*
- *[Jam priparolata: V.Esp.O]*

**Alispecaj partneroj:**

- IEJ: interŝanĝo de 2 plentempaj helpantoj inter IJF2024 kaj JES24-25.
- BEMI: biciklo-karavano al JES
- V.Esp.O: subteno por la vespera programo kaj kontakto kun ĵurnalistoj
- FEL: libroservo *(konfirminda)*

- IESPA: ekskurso en la 2a de januaro
- @esperanto_world: konsilado pri varbado en sociaj retoj
- Joleŝo: kreado de Jutubvideoj

Ni intencas disvolvi bone videblan rekoneblan komunikon pri niaj partneroj per aparta paĝo en nia retejo, mencio en niaj novaĵoj al aliĝintoj kaj (tiom kiom GDPR-leĝaro promesas:) per persona alskribo de aliĝantoj, kiuj indikas ne jam esti membro ne ajna asocio sed ja ŝajnas logikaj kandidatoj por konsideri membrecon en iu de niaj partneraj asocioj.

Ni petas la estrarojn kaj aliajn aktivulojn en viaj organizoj do konsideri ajnan specon da partneriĝo kun JES: precipe per **novulo-patroneco**, sed ankaŭ estus kuraĝige al ni se vi havas proponon provizi ĉi aŭ estonta JES per homforto, materialo, videbleco aŭ io eĉ pri kio ni ne jam pensis!

Al la jam partneriĝintaj organizoj/personoj, ni petas provizi nin per bonkvalita versio de via logotipo kaj prefereta ligilo al retejo, kiun ni publikigu.
Al ĉiuj Esperantistoj de Eŭropo ni evidente petas rekomendi nian eventon al feriemaj Esperantistoj, precipe junaj (kerna celgrupo: 15-35 jaroj).
Jam pluraj unuopaj Esperantistoj donacis monon al JES por alia plibonigprojekto: solidara, kultura kaj ĝenerala JES-fondusoj. Precipe la **solidara JES-fonduso** povus interesi ankaŭ junajn membrojn de viaj organizoj: ni ja daŭre akceptadas kandidatiĝojn de junuloj kiuj ne kapablas tute memstare financi sian vojaĝon kaj partoprenon al JES. *Unue ni prioritatigis ekster-Eŭropajn kandidatojn, sed la sekvajn kandidatojn ekselektos ankaŭ inter Eŭropaj junuloj.*

Laste, kiel varbisto de JES, mi ne maltrafu la okazon atentigi vin pri la diversaj societejaj kontoj kiujn ni kreis kaj ĉe kiuj troveblas malsamaj varbiloj kiujn vi volonte plu-disvastigu. Aparte mi atentigas vin pri la duon-sukcesa* investo kiun ni faris pri sinprezento, pli taŭga ol io ajn kion ni disponis por komencantoj aŭ eĉ ne-konantoj de Esperanto: la subtekstigata video 'Kio estas JES'.
Se vi kredas ke ne troveblas inter tiuj publikaĵoj, taŭgaj por la publiko aŭ komunikiloj de viaj organizoj, tiukaze alskribu nin por ke ni helpu vin diskonigi nian partopren-inviton en adaptita formo.
**Kun la limigitaj rimedoj kaj tempo kiun ni havis, ni ne sukcesis fari produkton kun pli bona sonkvalito.*

Kunlaboreme,
Delfeno, propagandisto de JES24-25